



Bonvenon al la nova Esperanto-Plaĝo en Hispanio! Aprilo kaj Majo, 2019

Saluton! Eble kelkaj el vi memoras, ke dum mia prelego-vojaĝo en Francio en aŭtuno mi anoncis la novan, unikan, longdaŭran kursaron en Esperanto-Plaĝo (Cullera (Valencia), Hispanio) por emeritoj kiuj volas eklerni kaj praktiki Esperanton en intensaj, profesiaj kursoj ĉe unu el la plej belaj marbordaj urbetoj de Hispanio. Foto sube.

Se vi volas informiĝi pri la nova, unika, internacia Esperanto-Plaĝo, jen kelkaj utilaj informoj por vi:

Datoj Inter la 1a de aprilo kaj la 31a de majo de 2019, 2-monatoj, 61-tagoj, vi povas loĝi apud la marbordo, kaj lerni kaj praktiki Esperanton dum tre intensaj kursoj en aprilo, kaj ne-intensaj kursoj en majo, por havi pli da libera tempo en la bela, bonvetera regiono de Valencio.

Gelernantoj La kurso estas por komencintoj aŭ progresantoj, sed ankaŭ por tutnovaj lernantoj kiuj estas sufiĉe bonaj lingvolernantoj. Ankaŭ eblas aliĝi unu aŭ du esperanto-instruistoj por lerni instrui per la Valencio Metodo kaj per la BEK-Kurso. Instruistoj plene partoprenos la kursaron. Jam aliĝis 3 azianoj (Ĉinio, Japanio, Koreio) kiuj partoprenos en ĉi tiu unua jaro, kaj nun restas 3 lokoj por Eŭropanoj.

Kurso-enhavo En la unua monato (aprilo), la intensa parto, ni utiligas la BEK-Kurson speciale adaptitan por kun-uzo de kaj Azianoj kaj Eŭropanoj. En la dua monato, ni pristudos diversajn materialojn, inter kiuj estos UNESKO-Kuriero, Universitato de Esperanto www.universitato.info, kaj literaturo kiel Don Kihoto, ktp

Vizitantoj Gelernantoj restos la tutan tempon, 61 tagojn, sed eblas al vizitantoj kaj akompanantoj alveni al la feria urbo Cullera, kaj resti tiom kiom ili volas: tagojn, semajnojn, monatojn. Multaj francoj, fakte, loĝas en Cullera la tutan vintron pro la milda mediteranea klimato. Bonvolu noti, ke se vi povas flugi rekte de Parizo al Cullera kun prezoj ĝis nur 49 eŭroj, iri kaj reveni.

Kursokotizoj Se vi venas kiel lernanto aŭ instruisto-lernanto, la kurso-kotizo estas 380 eŭroj por dumonatoj (proksimume 45 eŭrojn semajne), kaj vi povos pagi tiun kurso-kotizon post via alveno en Cullera. Se vi venas kiel akompananto de lernant(in)o, vi tute ne pagos kurso-kotizon. Vizitantoj restas senpage.

Hispana Kongreso Kursanoj de Esperanto-Plaĝo, se ili deziras, povas aliĝi al la HEF Hispana Landa Kongreso, ĉi jare en Malaga. Tiu kongreso okazos en la unua parto de majo. Laŭeble, revenante al Cullera de la Hispana Kongreso, oni povas viziti Sevilan, Cordoban, kaj Granadan.

Loĝado Apudmara aŭ proksim-mara loĝejoj lueblas, por 61 tagoj kontraŭ proksimume 800 eŭroj. Ĉiuj loĝejoj havas salonon, banĉambron, unu aŭ pliajn dormoĉambrojn, kuirejon, ĉiajn ilojn lavmaŝinon, balkonon (kvankam estas esceptoj), kun aldona sofao-lito en la salono. Eĉ en unudormoĉambra loĝejo kutime eblas dormi kvar se vi venos “grandfamilie”.

Monŝparebleco: Eblas loĝi ĝis kvar homoj en unu apudmara loĝejo, do en tia kazo, la tuta prezo, ekzemple 800 eŭroj, estus nur 200 eŭroj por 61 tagoj, kun ĉiu persono pagante nur 3 aŭ 4 eŭrojn ĉiutage. Kaj kun bona supermerkato je kelkaj minutoj piede, kaj prezoj multe pli malaltaj ol en, ekzemple, Parizo aŭ Londono, (hieraŭ mi aĉetis tri kilogramojn da organĝoj kontraŭ nur unu eŭro,

Informiĝi aŭ Aliĝi Por pli da informo aŭ por aliĝi al la intensa kursaro, bonvolu kontakti min ĉe keefeinchina@gmail.com Por informiĝi pri loĝejoj se vi volas nur viziti iom da tempo, bonvolu rigardi www.alquitur.es (retejo en franca, germana, angla, hispana lingvoj).

Por atingi Valencion, Cullera-n Facile. Unue al la malmultekosta internacia flughaveno de Valencio (VLC), poste rekte per metroo al la stacidomo (20 minutojn), kaj de la stacidomo, rekte al Cullera (34 minutoj), kun trajnoj ĉiuj 15-30 minutoj.

Amike,

Dennis Keefe
Cullera (Valencio), Hispanio
keefeinchina@gmail.com